

LA KVAR KOLONOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

de João José Santos
Portugalio, 2007-10-06
joaojosesantos@gmail.com

Estimataj kunordigantoj de ĉi tiu evento!
Karaj esperantistoj!

Saluton al ĉiuj, en ĉi tiu agrabla etoso de la urbo Figejro, kie la poezia rivero Mondego alfluiĝas en la Atlantikon.

ENKONDUKO

Profitante la momenton de la jara renkontiĝo de la portugaliaj esperantistoj, mi invitas vin pripensi la kolonojn de nia landa movado, kiuj subportas ĝian estonton. Permesu, amikoj, ke mi komencu per starigo de kelkaj pensigaj demandoj al ni mem, portugaliaj esperantistoj:

Kion ni volas por nia enlanda movado en la estonto? Ĉu ni kontentiĝas esti *ad aeternum* esperanta movado apenaŭ ekzistanta? Ĉu la portugalia esperanto-movado estas kondamnita agadi laŭ la individuaj iniciatoj de kelkaj el ni? Eble ni atendas ke Don Sebastiano ¹ venu el Bruselo, por fari kio dependas de ni mem. Se estas tiu la spirito de la aktuala esperantistaro, almenaŭ oni ne povas akuzi nin, ke ni ne havas veran luzidan spiriton. Tamen, mi certas ke ni ĉiuj konscias ke:

¹ Aludo al la portugalia mito pri la reĝo Don Sebastiano (1554-1578), kiu mortis 24-jaraĝa, en milita aventuro por konkerado de Maroko al la araboj. Tie li restis porĉiame. La portugalia popolo neniam rezignis, kaj ankoraŭ nuntempe atendas, ke nia reĝo Don Sebastiano iam aperu tra nebula mateno, por solvi niajn plej malfacilajn problemojn. Al tiu teniĝo oni nomas sebastianismo, kaj ĝi fekunde influis geniajn portugalajn verkistojn kiel Pastro Antono Viejro (por: Padre António Vieira) [ˈpadr anˈtonjo viˈejra] kaj Fernando Pesoo (POR: Fernando Pessoa) [ferˈnandu peˈsoa], i.a.



João José Santos prelegante en Figejro (por: Figueira da Foz) [fiˈgejra da fosh], en Portugalio, la 6-an de oktobro 2007, okaze de la 23-a Renkontiĝo de la Portugaliaj Esperantistoj.

1-e, la estonto de la portugalia esperanto-movado dependas de la nunaj portugaliaj esperantistoj;

2-e, ke do nia responso pri tiu estonto estas absoluta;

3-e, ke ion ni devas fari por rompi ĉi tiun ripeteman cirkolon de neevoluo.

Verŝajne, kelkaj el ni eĉ havas kroman intereson en la evoluo de la portugalia esperanto-movado. Mi aludas al tiuj kiuj edukis aŭ edukas la gefilojn sub ia influo de la esperantistaj valoroj, kaj kelkaj el tiuj infanoj eĉ estas denaskaj esperantistoj. Kiun torĉon ni pasigos al ili? Ĉu apenaŭ brilanta torĉo?, aŭ vivverde brilanta lumego heliganta novajn horizontojn? Ni, esperantistoj kredas, ke la laboro por esperanto, estas ja laboro en la kampo de la internacia kulturo, kiu helpas la homojn esti pli respektemaj, pli pacaj kaj pli feliĉaj. Tiun torĉon ni pasigu al niaj gefiloj en landa movado pri kiu ili povu fieri.

LA REVO

Mi revas ke iam, se eble ne tre malproksime, la portugalia esperanto-movado ne plu estu la malriĉa frato de la aliaj naciaj

esperanto-movadoj.

Jen kelkaj ekzemploj pri aliaj movadoj:

La hungara esperanto-movado havas pli ol 30,000 diplomitajn esperantistojn. En la germana urbo Herzberg, jam eblas nun peti, en restoracio, manĝoliston en esperanto, kaj jam videblas, en kelkaj stratanguloj, ŝildoj kiuj indikas la esperanto-klubon. La ĉina esperanto-movado estas tiel granda ke, antaŭ nelonge, en iu urbo, komenciĝis elementa esperanto-kurso kun la partopreno de 600 novaj lernantoj de esperanto. La kvalito, nombro kaj vario de la brazila esperanto-movado estas facile takebla, se oni konsultas ĝiajn paĝojn en interreto. Kaj ni, portugaloj? Ĉu ni daŭre kontentiĝas kun minimuma kaj ne organizita movado, kiu fojfoje briletas per la individua iniciatemo de iu el siaj anoj?

En unu el la poemoj de sia verko Mesaĝo, Fernando Pesoo verkis: "Di' volas, la homo revas, la verko iĝas". Mi fidas, ke Dio volas, ke esperanto estu plensukcesa en Portugalio. Revoj pri esperanto, mi certas, ke ne mankas en la koro de ĉiu el ni. Tamen, inter la revoj kaj ĝiaj realiĝoj, estas hiato, tamen grava hiato, kiu nomiĝas "laboro".

Mia revo, karaj amikoj, estas ke finfine ne estu unu portugalo, kiu povu diri honeste ke li neniam aŭdis paroli pri esperanto. Mia revo estas la evoluigo de nia movado, kvante kaj kvalite, al stato de vere impona movado. Tio okazos, se ni deziras, se ni volos, se ni laboros por tio. Mi bedaŭras, ke mi devas doni al vi tristan noticon: Don Sebastiano mortis kaj ne revenos.

LA KVAR KOLONOJ

Tiu laboro, miaj amikoj, estas kvarkolona: **disvastigado, instruado, verkado, uzado** de

la lingvo esperanto. Sen tiuj kvar kolonoj, ne estas estonto por nia movado. Ĉiuj niaj kvar kolonoj (**disvastigado, instruado, verkado, uzado**) estas ankoraŭ etaj, sed ili ja ekzistas. Ili povas eĉ akiri rapide grandan rezistokapablon, se ni ligos niajn kvar kolonojn per traboj. Tamen, okazas ke, pro nia portugalia individueca tendenco, eĉ ĉiu el la kolonoj ne estas fortike konstruitaj, ĉar mankas cemento inter la partoj de ĉiu kolono. Pro la sama individueca teniĝo mankas la traboj kiuj povas interligi la kolonojn.

Amikoj! Mi estu iom pli klara! Sen strategia plano ni iras nenien! Jen kelkaj ekzemploj pri individuaj laboroj de kelkaj el ni. Luís Ladeira laboras en sia lerneja plano en la kampo de la instruado, sed sola li atingos la solecon. João José Santos laboras sklave en la kampo de la originala kaj traduka verkado, sed en soleco li nur trovos sklavan laboron. António Martins kaj Alcino Alves bele ordigas la sidejon de Portugala Esperanto-Asocio en sia soleca laboro, sed la vizitantoj daŭre estos tre malmultaj. Mi supozas, ke ĉi tiuj tri ekzemploj sufiĉas por doni bildon pri la situacio de nia movado. Ni havas dediĉemajn esperantistojn, kiuj jam faris multon, sed mankas kunordigo de tiuj apartaj laboroj, mankas la traboj kiuj ligas la kvar kolonojn, mankas strategia plano. Ni iom pripensu pri la avancoj de nia movado rilate al la kvar kolonoj: **disvastigado, instruado, verkado, uzado**.

Mi petas al vi, karaj amikoj, ke vi bildigu en via spirito fortikan konstruaĵon kun kvar kolonoj, eble templon, sur kiu konstruiĝas la estonto de esperanto. Mi petus ke tiu bildo estu Partenono, sed ĝi efektive havas multe pli ol kvar kolonoj.

LA DISVASTIGADO

La disvastigado de esperanto en Portugalio preskaŭ ĉiam okazis laŭ la individuaj iniciatoj de dediĉemaj esperantistoj, kiuj agis per si mem, kun la helpo de malmultaj aliaj, kiuj hazarde estis proksimaj, kun minimuma agplano, sen kunordiga laboro kun la instruado.

Rilate al la disvastigado de esperanto, ni devas havi tri ĉefajn celojn:

- 1** – informi la publikon pri la ekzisto de esperanto, pri ĝiaj sukcesoj kaj ĉefe pri ĝiaj celoj;
- 2** – krei publikan opinion favoran al esperanto, kiu konsistigos nian socian apogan bazon, kio faciligos la avancon de esperanto en la socio, en la reala vivo de la homoj;
- 3** – varbi homojn al la esperanto-lernado.

Kiam mi ankoraŭ estis studento de la Beletra Fakultato de La Universitato de Lisbono, en du lernjaroj, mi disvastigis esperanton inter la studentoj, kun tuja invito ke ili lernu la lingvon, kio okazis en du elementaj kursoj, en du semestroj. Kie estas nun tiuj du lernklasoj de esperantistoj? Ili ĉiuj sekvis sian vojon ekster esperantio, ĉar ni ne havis organizan kapablon gvidi ilin en la uzadon de la lingvo. La historio montras ke, en plejparto de la landoj, el ĉiuj kiuj lernas esperanton, nur la plej fervoraj restas en la movado. Tiuj kiuj lernis esperanton kaj fariĝis esperanto-parolantoj, sed ne tre fervoraj esperantistoj, ne trovas kialojn por resti ligitaj al la movado. Dum dektri jaroj mi estis profesia instruisto en dektri lernejoj de la nordo al la sudo de nia lando. Mi instruis esperanton en ĉirkaŭ kvin el tiuj lernejoj. Mi certas ke, en tiu disvastiga kaj instrua laboro por esperanto okazinta en tiuj lernejoj, la tri celoj de la esperanto-disvastigado estis

atingataj, kaj ankaŭ oni atingis la celon instrui esperanton al ili, sed tiuj instruistoj kaj lernantoj ne fariĝis esperantistoj, pro manko de sinsekva laboro, pro manko de kunordigado inter la kolono de la instruado kaj tiu de la uzado de la lingvo, finfine pro manko de ĝenerala nacia strategia plano, kiu kapablu arigi tiujn homojn kaj kaŭzi interesojn en iliaj spiritoj, tiel ke ili ion faru en la esperanto-movado.

Aliaj portugaliaj esperantistoj plenvolore disvastigis esperanton diversloke, diversmetode, tra dekoj da jaroj, kaj ofte tiuj klopodoj rezultigis esperanto-kursojn. Mi mencias kelkajn el tiuj klopodoj, petante pardonon al tiuj, kies nomojn kaj spertojn mi ne mencias, nur pro hazarda elekto. En radistacio, nia kara Franco Simões, jam forpasinta, parolis kelkfoje pri esperanto. En siaj privataj lernejoj, nia kara Correia Coimbra, ankaŭ forpasinta, instruis esperanton al aliaj instruistoj kaj al lernantoj. Kaj multaj aliaj valoruloj, kelkaj jam foririntaj al la mondo de la vero, aliaj feliĉe ankoraŭ inter ni, disvastigis kaj instruis nian lingvon en multaj lokoj de nia lando, per diversaj metodoj. Menciindas la laboro de la nordaj esperantistoj, kiuj disvastigas esperanton kaj produktas eventojn. Ne eblas ne mencii la grupon de Alkoŝeto ², kie la nelacebla Cosme Resina kaj aliaj instruas kaj lernas esperanton. Ĉu eblas forgesi la laboron de la elstara António Almeida? Dum sia tuta vivo, li instruis esperanton, verkis librojn pri esperanta lingviko, kaj agis en aliaj esperantistaj laboroj. Oni povus mencii multajn aliajn agojn de disvastigo kaj instruado de esperanto tra la lastaj dekoj da jaroj en nia lando. Tamen, miaj amikoj, nia movado ne

² por: Alcochete [alku'shet].

kreskas proporcie de tiuj klopodoj. Mi mem instruis dum sinsekvaj jaroj, sabate dum sinsekvaj horoj, esperanton al multaj klasoj en Portugala Esperanto-Asocio. Kelkaj el la plej elstaraj nuntempaj esperantistoj sidiĝis en mia klasĉambro. Kaj la aliaj kiuj ankaŭ tie sidiĝis, sed kiuj malaperis, kies vizaĝojn mi eĉ ne plu memoras? La problemo, miaj amikoj, kuŝas en la manko de nacia strategia plano kiu kunordigu la klopodojn de ĉiuj. Ni ne povas daŭre labori solaj, dors-turnitaj unu rilate al la aliaj, kvazaŭ ĉiu el ni volus atingi la celon sola. La disvastigado de esperanto postulas metodojn, postulas planojn, kaj postulas interligon kun la instruado de esperanto kaj kun ĝia uzado.

La mencio de kelkaj el la eventoj de la historio de esperanto en Portugalio eble ankaŭ estas interesa por montri al la novaj esperantistoj, ke esperanto jam ekzistis antaŭ ol ili aperis sur la sceno.

LA INSTRUADO

La instruado estas la kolono rekte ligita al la disvastigado. Do, la esperanto-instruistoj ne povos instrui sen antaŭa disvastigado, kaj la disvastigado sen instruado ne venigos homojn al nia movado. Do ĉi tiuj du kolonoj devas esti fortike interligitaj.

Dum la lastaj ĉirkaŭ dudek jaroj, mi estis la reprezentanto de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) en Portugalio. Mi jam publike, en interreto, anoncis ke mi atendas ke sufiĉe adekvata homo prenu ĉi tiun taskon organizi la esperanto-instruadon en Portugalio, por ke mi demisiu. Tio neniel signifas ke mi ne plu instruos esperanton. Tute ne. Mi daŭre instruos esperanton, disvastigos ĝin, provos uzi kaj uzigi ĝin kiel eble plej multe, kiel montras la blogo kiun mi iniciatis kaj ĉefe la

diskutgrupo en interreto, kie oni disvastigas esperanton en la portugala lingvo. Tamen, miaj amikoj, pro natura tendenco kaj formado, kaj ankaŭ pro la nuntempaj kondiĉoj de mia profesia vivo, mi decidis labori ĉefe en la literatura kampo, kaj ene de ĝi en poezio. Dum la lastaj monatoj mi atendis pacience, ke iu kuraĝu preni la reprezentecon de ILEI en Portugalio. Mi faris tiucelan inviton al kelkaj homoj, sed neniu akceptis. Pro mia etiko, mi ne povas daŭre okupi postenon kiun mi fakte ne prilaboras, kaj do, ĉi tie kaj nun, en la 23-a Renkontiĝo de la Portugaliaj Esperantistoj en Figejro, mi absolute demisias el la reprezenteco de ILEI en Portugalio. Morgaŭ mi informos la Sekretarion de ILEI pri mia decido. Mi preferas lasi ĉi tiun responson en la manoj de homo kiu sin dediĉu al la instrua fako, tiel serioze kiel mi mem fakis pri tio antaŭ jaroj. Mi ne havas motivojn por gluiĝi al posteno, en kiu devas esti homo, kiu nun havu kondiĉojn por sterna esperanto-kursojn tra la lando, kiu povu kunordigi ilin kaj rilatigi la portugalian esperanto-instruadon kun Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj. Krom la menciitaj motivoj por mia ekziĝo, ankoraŭ menciindas alia. Favore al la bona sano de la neprivataj institucioj, gravas ke la homoj ŝanĝu la seĝojn, por ke la postenoj kaj la institucioj ne ŝlimiĝu, kreante bakteriojn kaj raŭpojn, kiuj certe difektos la ceterajn meblojn. La ŝanĝo de la reprezentanto de ILEI en Portugalio certe donos aerfluigon al ĉi tiu fako, kio kontribuos por ĝia disvolvo.

Foje okazas esperanto-kursoj tie kaj alie en nia lando, tamen tio ne sufiĉas por antaŭenigi esperanton. La reprezentanto de ILEI devas krei simplan sed efikan sistemon de instruado kaj testado por la tuta lando,

ebligante kontaktojn inter la lernantoj, tiel ke nia esperantistaro efektive kresku laŭ organizita maniero. Urĝas do, trovi la ĝustan homon, kiun mi helpos, se necese, por efika estrado de la esperanto-instruado en Portugalio.

LA UZADO

La uzado de la lingvo estas nia tria kolono. Precize ĉi tiu kolono estas la plej malalta kaj malforta en nia landa movado, kaj en ĉiuj landaj movadoj.

Oni supozu, ke ni informis homojn pri esperanto, ni konkeris ilin al niaj ideoj, ni varbis kelkajn el ili, kaj jen la novaj fervoruloj eklernas esperanton. Alveninte al la fino de la elementa kurso, plejparto da ili ne scias kion fari per la nova lernita lingvo. Plejstrange, ni mem esperantistoj, ne scias kiel enkonduki esperanton en la vivon de la ĵus bakitaj esperantistoj. La socia, labora kaj familia problemaroj, kiuj atingas nin ĉiujn, iom post iom distigas tiujn homojn de esperanto, kiu restos en ilia koro, kiel bela revo... forlasita. Tiu ne estas problemo ekskluziva de la luzidoj, ĝi estas la granda problemo de la tutmonda esperanto-movado. Mirinde, ke eĉ elstaraj esperantistoj ankoraŭ ne komprenis, ke tie situas unu el niaj plej grandaj obstakloj al pli rimarkinda avanco de esperanto en la mondo.

Estas necese, ke grupoj de esperantistoj sin arigu por starigi etajn entreprenojn pri tradukado, pri instruado, pri vendado de suvniroj, pri gazetoj, pri io ajn kiu estu ĉiutaga labora ago. Esperanto devas vivi ene de la socio, ne nur en la esperanto-kluboj. Jam stariĝis, en aliaj landoj, kelkaj entreprenoj kiuj uzas esperanton kiel sian laborlingvon, sed la fenomeno ankoraŭ ne atingis sufiĉe grandan dimension, fakte ĝi ankoraŭ donas siajn unuajn

paŝojn. Kiam, en la fino de elementa kurso, ni proponos al junulo laboron en esperanta entrepreno, tiam ni sentos ke esperanto eniris finfine en la socian vivon de la homoj.

Rilate al agnosko far la politikistoj, kredu min, miaj amikoj, ke ili nur apogos esperanton kiam, kaj nur kiam, nia lingvo donos al ili monon kaj ĉefe balotajn interesojn. Pri tiuj kuloj, mi ne parolos pli.

LA VERKADO

Finfine, karaj amikoj, pacienca aŭskultantaro, ni iom pripensu pri la kvara kolono, mia preferata kolono, kiun mi plej amas masonas, **la verkado**.

Eble kelkaj pensas, ke jes, la romanoj, la teatraĵoj kaj la poemoj estas belaj ekzistaĵoj en iu ajn lingvo, sed ke la avanco de esperanto ne dependas de la beletraj verkoj. Tiu eraro estas plorinde ripetata far homoj sen beletra kulturo. Ni, esperantistoj, ne pensu tiel!

La lingvoj estas vivantaj estaĵoj. Ili naskiĝas, kreskas, spiras, sin nutras, edziĝas kun aliaj lingvoj, foje fakte temas pri nura flirto!, naskas idojn, kaj iam mortos. En tiu proceso, la lingvo adaptiĝas al la socio kiun ĝi servas, en reciproka influo, gajnas novajn vortojn kaj esprimojn, perdas aliajn, kaj ĉi tiu kompleksa proceso nomiĝas lingvo-evoluo. Tiu evoluo dependas de la propra strukturo de tiu lingvo, dependas de la ecoj de la propraj lingvo-uzantoj, dependas de la filologoj kaj de la instruistoj, sed ĉefe ĝi dependas de la literaturistoj. Pro la agnosko de la enorma povo de la poetoj, Platono ilin forpelis el sia Respubliko. Estas en la literaturo, kaj ĉefe en la poezio, ke la lingvo profundiĝas kaj sternaĝas, streĉante sin mem, por lertiĝi en la kapablo esprimi ne nur ĉiutagaĵojn, sed ĉefe la sentojn,

la homrilatojn, la revojn, la filozofiajn konceptojn. Lingvo ne prilaborita poezie ne estus pli ol rudimenta lingvo por banalaĵoj. La homo estas esence homa per sia koro kaj menso, kaj oni ne lernas paroli pri mensaj kaj koraj aferoj, uzante nur la bazajn esprimojn de la lingvo. Nia kara lingvo, esperanto, ĉiam havis, ekde la komenco de sia ekzisto, tiun elanon kiu katapultis ĝin al la nuna stato de plenvalora, matura kaj esprimiva lingvo. Tio tute ne eblus sen nia originala kaj traduka literaturo, kies unua poeto estis la propra genio Ludoviko Lazaro Zamenhofo, kiu al ni indikis la vojon.

Karaj amikoj, multaj ne scipovas verki soneton, kaj eĉ neniam verkis rakonton. Enorde! Ĉiu rajtas je siaj propraj lertecoj kaj mallertecoj. Tamen ĉiu ajn montros absolutan mankon de beletra kulturo kaj eĉ de korsento, se tiu ne estas tuŝita de la beletraĵoj aŭ se minimume ne kapablas kompreni la valoron de beletra kaj ĝian neprecon en la maturiĝo de iu ajn lingvo. Nia nuna troteknika socio praktike demetas la filologiajn studojn el la lernejoj, tiel kontribuante por la ekapero de novtipa speco de analfabetoj: tiuj kiuj scias kio estas aidoso, DNA kaj ekster-teraj vojaĝoj, laboras per komputiloj kaj klavumas en la interreto, sed kiuj ne konas infanrakonton por dormigi siajn idojn. Stranga mondo!

Miaj amikoj, Fernando Pesoo diris iam, ke lia patrio estas la portugala lingvo. Dirinte tion, li certe ne intencis neniigi sian portugalian civitanecon, sed eĉ refortigi ĝin per la agnosko, ke la lingvo estas la kultura perilo kiu trapasas generaciojn, arigante kaj disvastigante la valorojn de la popoloj kiuj ĝin uzas. Inter kelkaj miloj da lingvoj parolataj de la homaro, la portugala lingvo estas la kvina plej parolata,

kaj ĝi ekzistas kiel beletra lingvo de antaŭ ĉirkaŭ 800 jaroj. Miloj kaj miloj da verkoj transportas gravajn valorojn kiuj konstruis la animon de nia popolo, kaj de kelkaj aliaj popoloj en la mondo. Malmultaj el tiuj verkoj jam estas tradukitaj al esperanto. La plejparto ne. Post kelkaj tagoj, ankoraŭ en ĉi tiu monato de oktobro, eldoniĝos en podofa, unuafoje, la revuo LA KARAVELO, kies ĉefa celo estas la tradukado de beletraj verkoj el la portugala lingvo, sendepende de la lando kie tiuj verkoj naskiĝis. Tiu projekto sufiĉe bone montras kiun vojon mi sekvos en la esperantista laboro. Tamen, tiun vojon mi ne paŝos sola. Ĉiuj portugallingvaj literaturemaj homoj el la tuta mondo, estu aŭ ne fakuloj pri la afero, estas invitataj partopreni en ĉi tiu projekto, kiun mi plezure kunordigos en LA KARAVELO.

KONKLUDO

Karaj amikoj, mi konkludas ĉi tiun prelegon redirante al vi:

Mankas strategia plano al nia movado. La strategia plano donos koherecon al ĉiu el la priparolitaj kolonoj, kaj ligos ilin fortike inter si. Gravus ke ni sciu kion ni volas, kaj kien ni iras. La portugaliaj esperantistoj daŭre navigas en unuopaj barkoj senpilotaj, sen senco kaj eĉ sen direkto, sed tio ne estas fatalo, tion ni povas kaj devas ŝanĝi.

Dankon pro via afableco aŭskulti min.

Ekde nun malfermiĝas debato pri ĉi tiu temo.